Sennacieca Asocio Tutmonda

# HISTORIO DE S.A.T.

## 1953 ~ 1981

Broŝurservo de S.A.T.

Cercle espérantiste de l'Agenais
"Laŭte!" * F 47340 Laroque Timbaut
*********************************

1982 * 4 FF

# ENKONDUKO

Tiu ĉi broŝuro estas la daŭrigo de unu volumo, kiu sub la sama titolo priskribis la fondon kaj la dudek kvin unuajn vivjarojn de nia Asocio (jaroj 1921-1952).

Multaj SAT-anoj petis nin prizorgi, ĝuste okaze de la 60-jareco de la Asocio, la publikigon pri la eventoj en la jaroj, kiuj sekvis la unuan periodon kaj kiuj estis malpli ŝtormaj ol la unua kvaron-jarcento.

S.A.T. firmiĝis kaj certigis sian pluekziston laŭ ĉiaj manieroj de aktiveco, subtenate de la Laboristaj Esperanto-Asocioj lingvoregionaj (L.E.A.oj), kiuj estas ligitaj kun nia organizo per la Gotenburga Konvencio de la jaro 1928.

La unua parto de la HISTORIO finiĝis kun noto pri la morto de unu el la fondintoj de la Asocio, K-do Ludoviko GLODO, je la 13a de novembro 1952.

Fakte nia movado eniris periodon de stagnado date koincidanta kun la milito en Koreio, kiu signifis la kulminon de la "malvarma milito" inter Oriento kaj Okcidento kaj kiu timige alproksimigis la fantomon de Tria Mondmilito.

Tiu tutmonda malcerteco bremsis nian, kiel cetere ĉiujn kulturajn movadojn, kaj la bela ekiro de nia Asocio postmilite en preskaŭ ĉiuj landoj subite haltis. Tiutempe nur en Jugoslavio, kiu havis fenestrojn malfermitajn al la ekstera mondo, Esperanto kaj S.A.T. rapide progresis en la periodo komenciĝanta kun la jaro 1953. Stagnado en tiu lando sentiĝis nur plurajn jarojn post la SAT-kongreso en Beogrado (1956).

Malkresko de la membraro fariĝis kontinua problemo. La pioniroj el la periodo inter la du mondmilitoj maljuniĝis, kaj la morto riĉe rikoltis inter ili. Fariĝis por la Laboristaj Esperanto-Asocioj landaj ĉiam pli kaj pli malfacile organizi kursojn, krei novan aktivularon, pro manko de interesitoj. Kaj sekve ankaŭ la alfluo de novaj membroj al SAT ege malrapidiĝis.

Tamen SAT eldonis siajn organojn regule, la monatan "Sennaciulo"-n kaj unu fojon jare "Sennacieca Revuo"-n (60-paĝa ilustrita kajero), la Jarlibron kun la membro-adresaro ĉiun duan jaron. K-do Bartelmes prizorgis daŭre la redakcian taskon, plenumis ankaŭ tre grandan parton de la administracia laboro, inkluzive la kompiladon de la jarlibro.

Al vi, legantoj de tiu ĉi broŝuro, ni deziras ne nur la ĝuon de ordinara literatura legaĵo, sed senduban studplezuron pri faktoj kaj eventoj, travivitaj persone de la malnovuloj kaj instruaj por la novuloj, kiuj plu portos la torĉon. Vi ofte prenos ĝin en manon por konsulto ; kaj ĝi estas baza verko utiligota en SAT-rondoj de la tuta mondo, kiam la anoj diskutos pri celoj kaj praktikaj manifestiĝoj de nia movado.

## La Kongresoj daŭre kunigas la SAT-kolektivon.

La Kongresoj de la jaroj 1953 - 1955 estas bone organizataj, pri kio havas plenmeritojn unuopaj gekamaradoj. Por 1953 en la Sinjora Domo Wortley Hall apud Ŝefildo zorgis modele gek-doj Melton (la nombro de partoprenantoj estis bedaŭrinde tre malalta : 185). Tiu kongreso unuanime malakceptis proponon de K-do Sulski, konforme al la vidpunkto de la Plenum-Komitato aranĝi kongreson nur ĉiu-dujare. P.K. skribis :

"Ni ne vidas, sur kio baziĝas la pesimismo de la proponanto. La nombro da landoj, kiuj povas inviti SAT-kongreson, estas supera al tiu antaŭ la milito (kiam centra Eŭropo estis faŝista)..." Kelkaj valoraj prelegoj riĉigis tiun ĉi kongreson Nº 26.

Por la Kongreso 1954 en Nancio faris la elstaran preparlaboron K-do Petro Louis ; partoprenis en atmosfero frateca kaj esperoplena 480 kongresanoj. La gvidrezolucio substrekas la neceson de ambaŭ aloj de la movado, la por- kaj peresperanta. La Kongreso petas la redaktantojn de Laboristaj Esp. Gazetoj "ne nur doni malavare lokon por komunikoj el la landaj SAT-perantoj, sed ankaŭ ĉiam denove tiri la atenton de la legantoj al la peresperanta, porsocialisma laboro plenumata de SAT."

Sukcesa postkongresa semajno de la junularo en Raono (25 partoprenantoj) ; geknaba kongreseto grupigis en la kongres-urbo 28 infanojn.

Por la Kongreso en Linz, Aŭstrio, en somero 1955 K-do Hollinger dediĉis preskaŭ sola siajn fortojn kaj sukcesis prezenti interalie tre belan artan pro-

gramon en tiu muzikama lando. La urba orkestro donis tutvesperan koncerton kun operetmuziko. Partoprenis 650 gekamaradoj tiun kongreson. Kvin prelegoj en la Laborista Universitato trovis atentan aŭskultantaron. En la gvidrezolucio oni esprimas la esperon pri baldaŭaj pli pozitivaj kontaktoj kun orient-eŭropaj esperantistoj.

Ĝenerala observo : ekde tiam por ĉiuj SAT-kongresoj la partoprenantoj atendas kaj postulas altnivelan artisman programon, kiu kadras la laborkunsidojn. Oni ne plu rezignas je teatro, folkloro, muzikaj prezentoj apud la prelegoj, kies nombro varias.

## Unuafoje en Jugoslavio.

Apartan brilon vestis la Beograda Kongreso, en 1956, ĉe kiu kunvenis 489 anoj. La kongreso vekis sufiĉe grandan intereson en la lando. En la malfermo ĉeestis la honora protektanto, Ĝuro Salaj, de la Sindikata Centro Jugoslavia. Ĉefa respondeculo en la Organiza Komitato estis K-do B. Maksimoviĉ. Ne nur la gazetaro, sed ankaŭ Radio Zagreb regule informis pri la evoluo de la kongreso. El la altnivela arta programo : teatro, dancoj, kantoj restos ĉiuj eroj en la memoro de la kongresanoj. La fakto, ke SAT en tiu lando havis plenan esprimrajton estas esperiga signo por estontaj kongresoj en tiu parto de Eŭropo. La gvidrezolucio inter aliaj punktoj "vokas ĉiujn progresemajn esperantistojn, kiuj ankoraŭ forestas el niaj vicoj, al unueca regrupiĝo, por ke SAT fariĝu la unika kaj potenca organizo de la laborista esperantistaro". - La infankongreseto kunigis 55 geknabojn. Tre bela aŭguro por la estonteco !

## Evoluo de la Junulfako de S.A.T.

En la fino de la unua volumo de "Historio" (p.126) ni indikis, ke la Junulfako preparas postkongresan renkontiĝon, en aŭgusto 1952, en urbeto apud Duseldorfo (Ratingeno) ; tie la gejunuloj loĝis kune en moderna Junulgastejo.

Tiu ĉi postkongreso havis certan sukceson, kaj oni trovas en la sekvo pli ofte en "Sennaciulo" informojn pri la aktiveco de la Fako. K-do Sykes vokas al junulfaka tendaro en Britio (apud Halifakso), kiu kunigas iom pli ol 30 partoprenantojn. Samjare (en junio) 42 gejunuloj, preskaŭ ĉiuj SAT-anoj, renkontiĝas por semajno apud Friburgo (Freiburg, Nigra Arbaro). Multobligita informilo aperas ĉiumonate en Parizo (kun la adreso de SAT-centro) en 250 - 300 ekzempleroj.

La organizadon de la junulara semajno en Raono, post la Nancia SAT-kongreso (vidu supre!), meritplene prizorgis K-do Kleinclauss, kiu fariĝis de tiam administranto de la Junulfaka informilo, kiu nomiĝas ekde tiam "La Juna Penso". Kdo P. Louis kaj la nanciaj junaj kamaradoj transprenis nun la regulan eldonadon de la Bulteno, kio estis ege necesa post preskaŭ 3/4-jara neapero en 1953. La nancianoj zorgis ĝis fino de la jaro 1957, kaj ekde januaro 1958 "La Juna Penso" aperas sub aŭspicioj de la Zagreba kolektivo en presita formo. Sed tre baldaŭ la eldono en Jugoslavio finiĝis, parte pro la financoj, parte pro malkonsento inter la respondeculoj. Tiam, pro alarmo de la Plenum-Komitato de S.A.T., K-dino Mia v.d.Starre deklaras sin preta savi la entreprenon (ekde komenco de 1959), kaj ŝi aperigas 23 numerojn de "La Juna Penso" en mimeografa preso. Ĉiuj ĉi numeroj estas bone redaktitaj kaj tre legindaj, kaj kun bedaŭro la P.K. cedas al ŝia deziro fini la junulfakan laboron kun la monato decembro 1961. De tiam Parizo transprenas la taskon, eldonante LJP en

mimeografa formo, sub respondeco de K-do Danot.

Depost la Pariza kongreso en 1971 LJP ne plu estas nura organo de la Junulfako, sed plilarĝigas sian rolon kaj enhavon, malfermante siajn paĝojn al la SAT-frakcioj, - nome al tiuj, inter ili, kiuj deziras akcepti tiun solvon de komuna tegmento (kelkaj eldonas plue propran bultenon).

Parizregionaj gekamaradoj, - ni citas Ĵaklinon Cignolo kaj L. Septier - daŭrigis aranĝi la gazeton. Ĝi aperis regule ĉiu-dumonate. Sed la redaktantoj, apogante sin sur decido de kunsido en Paris-Orsay-kongreso, ne volas limigi la rolon de LJP al organo de SAT-Junulfako. Tamen, per nova decido en la dua Aŭgsburga Kongreso (1977) "La Juna Penso" refariĝas organo de la Junulfako, kaj la redaktadon prizorgas K-dino A.S. Lévy ; pri la administrado sin okupas la tuta Levi-familio. Ne ricevante sufiĉe da subteno, - escepte de la efemeraj kunvenoj okaze de la SAT-kongresoj, la gazeto aperas tre malregule, ne plu dumonate.

Sennaciecan vojaĝoservon iniciatas komence de 1953 K-do Petro Louis kun la celo ebligi al gejunuloj reciprokan gastigadon. Respondeculoj por tiu Servo anoncis sin en kvin landoj, krom Francio. Bedaŭrinde la entrepreno ne longe vivis, pro manko de uzantoj.

## Geknaba gazeto de S.A.T.

La gazeteto, kiu ricevis la titolon "Nia Voĉeto", naskiĝis sekve de la Nancia SAT-kongreso (1954), en kiu, kiel jam notite, okazis sukcesplena infankongreseto. Gekamaradoj Louis akceptis la taskon

redakti kaj eldoni tiun novan organon de SAT, kiu aperis de tiam regule kvarfoje jare (do unu fojon por ĉiu sezono). K-do Louis eĉ esperis povi plioftigi la ritmon de publikigo, sed la superŝarĝo je taskoj malpermesis al li tiun realigon.

La infankongresetoj ekde tiu dato konis belajn sukcesojn : en Linz (1955) partoprenis en la aranĝoj 45 geknaboj, en Beogrado (1956) 55, en Roterdamo (1957) eĉ 61, inkluzive la infangrupojn delegitajn al la Kongreso el Jugoslavio. Okaze de tiu kongreso en Nederlando estis aranĝita radio-elsendo de geknaboj en Hoek v.Holland. Aparte intensa estis la propagando en Linz (1955), kie okazis kunveno de "Amikoj de Nia Voĉeto" por trovi ankoraŭ pli vastan disvastigon de la infangazeto tra la mondo esperantista.

De tiam la gazeto transiris en la manojn de K-dino Prent, kiu zorgis kun diligento kaj fervoro pri la regula apero de la gazeto, kiu ricevis novan titolon "Kalejdoskopo" ; redakt-helpon ŝi ricevis de K-do Gimbert, kiu kompilis la tekstojn senditajn de infanoj mem.

## La Roterdama Kongreso en 1957.

Por la dua fojo la Roterdama SAT-Rondo akceptis la taskon organizi nian jaran kongreson ; dudek jarojn antaŭe, en 1937, ĝi efektivigis la ĝis tiam plej grandan SAT-kongreson, kun 806 partoprenantoj. En 1957 partoprenis 590 gekamaradoj el 15 landoj. Ĉe la malfermo la ĉefministro W. Drees, membro de F.L.E., esprimis senrezerve sian simpation al nia movado en klare prononcita esperanta elparolo, en kiu li substrekis la avantaĝojn, kiujn prezentas esperanto por la tutmonda laborista movado. La akcepto de la tuta kongresanaro ĉe la urbdomo havis solenan karakteron. Ĉ. 400 anoj ĉeestis en la tri laborkunsidoj, kie okazis tre viglaj debatoj antaŭ la voĉdonoj pri la rapor-

toj. En sia gvidrezolucio la Kongreso vokas la membraron interalie "...nepre ebligi per sia toleremo, ke SAT restu ekzemplo de harmonia kunlaborado inter la diversaj tendencoj de la socialista laboristaro".

## En Finlando por la 31-a Kongreso.

Tiu kongreso en Helsinki (1958) ne altiris tre multajn partoprenantojn, nur 254, kiuj respondece laboris en la kunsidoj ; la gvidrezolucio esprimas multajn esperojn precize rilate normalan disvolviĝon de la Asocio, kiu trapasas financan krizon, ja ne la unuan en la vivo de SAT ! La Plenumkomitato vokas en artikolo "Rifo sur la vojo de SAT" al la oferemo de la membraro ; al la presisto necesas tuj pagi kvin numerojn de la gazeto. Feliĉe la voko estis tuj aŭdata kaj en la sekvantaj n-roj de "Sennaciulo" aperas longaj listoj de donacintoj kun imponaj sumoj, tiel ke la danĝero baldaŭ estas forigita, la financa situacio denove ekvilibra.

## Sub la signo de du jubileuloj.

En 1959 ni memoris en Dortmund pri la centjareco de la naskiĝo de D-ro Zamenhof kaj la okdekjareco de tiu de K-do E. Lanti. Iliaj portretoj staris en giganta formato dekstre kaj maldekstre sur la kongreseja podio. Ĉeestis en la ĉefurbo de la Rurregiono 425 kongresanoj, kiuj pritraktis interalie la pozicion de SAT en la Esp.movado, kiel tekstita en "Deklaracio", kiu aperis ĵus antaŭ la Kongreso, kiu finiĝas jene :

"SAT-anoj havas firme bazitan socian idealon. Ili ne postulas de alipensantaj esperantistoj, ke ili akceptu tiun ĉi idealon. Sed ili deziras kaj eĉ postulas, ke tiuj personoj, kiaj ajn estas ilia propra koncepto pri Esperanto kaj Esperantismo,

lasu ilin trankvile fosi sian sulkon ; ĉar la laboro de SAT servas finrezulte la tutan Esperantan aferon." Tiu deklaro estas ankaŭ akceptita de la Dortmunda anaro kaj reliefigita en la gvidrezolucio. En Dortmund denove la infanoj havis sian apartan programon (ĉeestis 30 geknaboj) kaj tre taŭgan kunvenejon en Infandomo Brackel, kie la programo efektiviĝis sub sperta gvidado.

## La jarkajero 1959 de SENNACIECA REVUO

estis dediĉita aparte al la Zamenhofa memordato, kun originalaj kontribuoj de K-doj Sulski, Caubel, Bartelmes, Laurat. La neŭtrala mondorganizo honoris Zamenhof per aranĝo de Jubilea Kongreso en Varsovio, kiun partoprenis 3250 esperantistoj el 45 landoj.

Pri Zamenhof kaj Lanti aperis krome pluraj memorartikoloj en "Sennaciulo". SAT ligis ja la centjarecon de Zamenhof kun la 80a datreveno de la naskiĝo de K-do Lanti.

Inter la mortintoj de tiuj jaroj ni menciu K-don Ernesto Eriksson el Stokholmo, socialdemokrata parlamentano, kiu pionire agadis por nia SAT-movado en Svedio kaj ankoraŭ en la kongreso 1951 en la sveda ĉefurbo signifoplene paroladis pri la perspektivoj de nia movado. Mortodato : 10. januaro 1956.

## Reago al publikigo de fuŝverko.

En la jaro 1956 la Plenum-Komitato decidis reagi kontraŭ la apero de fuŝverko titolita "Ilustrita Vortaro" (unua parto) verkita de Fr. Azorin (loĝanta en Meksiko). La P.K. sendis plurajn cirkulerojn al landaj Esperanto-Asocioj kaj gazetredakcioj, ankaŭ al iuj privatuloj, por averti pri la danĝero disvastigi tiun verkon. Samjare ankaŭ la Akademio de Esperanto deklaris, en oficiala komuniko, ke "tiu

vortaro atencas al la netuŝebla Fundamento kaj al la tradicio registrita en la Oficialaj Aldonoj, sekve ke ĝi ne prezentas la veran staton de Esperanto..."

## Eldonado de libroj.

Post plurjara stagno (la malrapida vendo de nia literaturo) nun aperas, en somero 1958 ĉe SAT granda originala romano de Sandor Szathmari : "Vojaĝo al Kazohinio", kiu trovas favoran akcepton ĉe la esperantistaro. Kaj jam en sia jara raporto al la Helsinka kongreso la Plenumkomitato parolas pri preparlaboroj por la giganta "Plena Ilustrita Vortaro" (P.I.V.), kiu efektive aperas nur en 1970. Necesis pli ol 12 jaroj por finverki tiun monumentan verkon, al kiu kunlaboris 14 kompetentuloj. SAT per tiu eldono meritas la dankon de ĉiuj esperantistoj.

## Magnetofon-Servo.

Sub la gvido de K-do C. van Essen (tiutempe nia nederlanda peranto kaj zorganto pri la ekspedo de "Sennaciulo") bone envojiĝas tiu nova Servo iniciatita en la Dortmunda Kongreso. La du unuaj sonbendoj estas anoncitaj en la oktobra n-ro 1959 de "Sennaciulo" ; en la januara n-ro 1960 la listo kreskis ĝis 9 bendoj. Bedaŭrinde tra la jaroj tre malmultaj personoj interesiĝis pri tiu servo, kaj pro tio fine K-do van Essen rezignis pri daŭrigo de la eldonado, pro la manko de interesatoj.

## Naturamika Internacio kaj SAT.

La Esperanta branĉo de la Naturamika Movado figuras sub la mallongigo T.A.N.E.F. Efektive tiu

Internacio konsentas kunlaboradi kun SAT, kaj TANEF de tiu tempo aranĝas siajn jarkunvenojn en la kadro de la SAT-kongresoj ; en 1981 tiu Fako eĉ organizas la Postkongresan semajnon en Svisio (Lucerno). SAT kompleze disponigas plurajn paĝojn en sia Jarlibro por la TANEF-adresaro (precipe nomo de la landaj perantoj).

## Monkolekto por libropakoj al Sovetio.

Tiucela propono en Dortmundo estis malakceptata en sia origina formo (nome kreo de nova helpkaso). Propono de K-do Grandière trovas la (preskaŭ unuaniman) aprobon de la Kongreso : estas konsilate mendi la librojn ĉe SAT sed mem efektivigi la ekspedon al Sovetio.

## Enketo por plivalorigo de la Jarlibro.

Al la marta n-ro de "Sennaciulo" 1960 estis aldonita Enketfolio, per kiu la administracio petas respondi, krom pri persono, aĝo ktp, ankaŭ pri specialaj deziroj (korespondado, kolektado) kaj eventuala indiko pri aneco al frakcio de SAT aŭ aliaj organizoj, por aperigi sub formo de kodo la donitajn indikojn en la Jarlibro post la nomo kaj adreso. La iniciato venis de aktiva kamarado M. Wajsblum, kiu, jam malsana, ne longe poste mortis. Ne estas pruvite, ke tiu sistemo plenumis sian rolon interligi pli intime la membrojn per korespondado kun samcelanoj. Ŝajnas, ke kelkajn ĝenis fine tiu kodigita informaro post ilia nomo kaj adreso, kaj ili petis la administracion forstreki tiujn indikojn.

La Jarlibro restis samampleksa, samaspekta, ĉiam kun dujara aperdato. La enkonduko ĉe preskaŭ ĉiuj Poŝtoj de la mondo de kodciferoj por la lokoj komplikis la redaktadon kaj postulis novan kompostlaboron, sekve plian elspezon. Fine por la eldono 1973-74 okazis grava novigo : oni aldonis ĉe la fino de la Adresaro alfabe-

tan liston laŭ la nomo de la membroj, kio multe faciligas la serĉadon de difinita adreso.

## Nova Servo : la Filatelia.

Al la jaro 1960 apartenas ankaŭ la starigo de "Filatelia Servo", kiun bonvole akceptis prizorgi K-do Frederiko Herbst en Duseldorfo. La Servo havigis al SAT atentindajn enspezojn tra la jaroj ; kvitancoj al la donacintoj aperis regule en "Sennaciulo". Sed K-do Herbst devis konstati, ke multaj sendantoj ne atentas pri la kvalito de la poŝtmarkoj por kolekto. Li ofte havis okazon plendi pri la multaj sendaĵoj kun difektitaj markoj. Li petis anstataŭigon kaj trovis bonvoleman kamaradon en la persono de K-do Ivar Paulsson, nia svedia peranto, kiu zorgeme plenumas tiun apartan taskon.

## Pluaj kongresoj kun kulturaj aranĝoj.

En la Dortmunda kongreso (1959) okazis Kultura aranĝo en la fama Vestfalia halego, kie salutparolis kiel SAT-ano la tiama urbestro de la Urbo, D. Keuning. Ankaŭ tre sukcesa kultura kunveno en Arhuzo (33a SAT-Kongreso), kie precipe knabina ĥoro distingiĝis. Ĉe la malfermo de la kongreso la urbestro Bernard Jensen, kiu iam okupis sin per lernado de esperanto, legis ampleksan salutparoladon en nia lingvo ; tion saman faris la prezidanto de la Komuna Sindikataro, G. Sörensen, per longa alparolo. Pluraj prelegoj estis reliefaj en tiu kongreso.

## La enhavo de "Sennaciulo" en tiu periodo.

Aperis multaj kunlaboraĵoj de Mark Starr en la gazeto, interalie pri Lanti kaj Naciismo ; K-do

Lagrange kontribuis per rimarkindaj artikoloj SAT-ideologiaj ; Skeldido (pseŭdonomo de F. Charlet) komencis tiutempe sian multjaran kunlaboron, kiu fariĝis konstanta kaj diskutiga. Frontartikolo en la februara n-ro 1961 estas dediĉita al la Laborist-Esperantista Asocio en Nederlando (F.L.E.), kiu tiu-jare, en majo, havas jubilean kongreson, pro 50-jara ekzisto. Unu el la fondintoj, tre maljuna K-do K.H. Meijer, havis la bonŝancon persone ĉeesti tiun Jubileon.

Naturamikoj kaj tendumantoj ĝuis en tiu ĉi jaro la inaŭguron de kampadejo Zamenhof en Vallon-Pont d'Arc, suda Francio. Urbestro kaj konsilantoj de tiu negranda sed pitoreska loko favoras esperanton. Motora forto estas K-do Petro Jayer.

## Laborista lukto speguliĝas okaze de la Kongreso en Gent.

La negranda sed fervora SAT-kolektivo en la belga urbo Gent organizis la 34-an Kongreson (1961) sub sperta gvido de K-do Bracke. Sur la fono la strikego de la belga laboristaro, kiu akriĝis ekde jarfino 1960. Nia kongreso ĝuas protekton kaj subvencion de laboristaj organizoj.

Okazas strata manifestacio de la kongresanoj, kiuj sub gvido de fanfaro kun tamburoj kaj trumpetoj moviĝas el la kongresejo al la urbdomo, kie estas aranĝita akcepto. En la gvidrezolucio de la kongreso la membraro estas admonata "konscii pri la graveco de la Asocia tasko akceli pacon en la mondo kaj la emancipiĝon mensan kaj materian de la laboristoj".

## La Viena kolektivo sukcesigis la ĉefurban kongreson en 1962.

Tiu granda centr-eŭropa urbo kun longega historia tradicio kaj ankaŭ kun vigla kerno da SAT-membroj

gastigis la 35-an kongreson de la Asocio en komenco de aŭgusto. Kvankam ne alvenis pli ol 465 kongresanoj, tamen en la Urbodoma solena akcepto ĉeestis preskaŭ 700 personoj, same kiel ĉe la Malfermo de la Kongreso ; tiuj manifestacioj havis apartan propagandan valoron pro la ĉeesto de K-do Franz Jonas, Viena urbestro en tiu tempo (pli malfrue Prezidanto de la Aŭstra Respubliko) kaj pro ties brilaj subtenaj paroloj. La Kongreso vokas en la gvidrezolucio "ĉiujn SAT-anojn persisti en sia strebado al pli alta kultura nivelo, sennacieca laŭ formo kaj enhavo, bazita sur pure racia kaj scienca esplorado, sampaŝe kun sia lukto por atingo de socio liberigita de ekspluatado ĉiuspeca, kaj kun helpo al ĉiuj klopodoj certigi la mondpacon por eviti militon."

## Literaturo.

Fine de 1961 mortis en Hungario la laborista poeto kaj SAT-ano Emeriko Baranyai (verkista nomo Emba), kies poemaro "Ekzilo kaj Azilo" prezentas talentan kaj vivproksiman laboron de homo kun SAT-spirito.

En 1962 aperas ĉe SAT la pri-estonteca romano de Sandor Szathmari, sub titolo "Vojaĝo al Kazohinio"; Szathmari pentras du homajn sociojn, el kiuj la "perfekta" estas same kritikinda kiel la nuntempa malracia fazo.

Entuziasma sennaciisto, K-do Adolfo V. aperigis propramone broŝuron "Lanti pri Sennaciismo" (16 grandaj prespaĝoj), kun artikoloj ekstraktitaj el la elĉerpita verko "Vortoj de Kamarado Lanti". La verko integre reaperis en 1978 ĉe K-do Baudé ("broŝurservo"). Adolfo per sia publikaĵo celis bari al kompleta malapero de la Lanti-verkaro, en

tempo kiam SAT ne povis jam financi la reeldonadon de tiuj libroj.

En la cetero en ĉiuj numeroj de "Sennaciulo" plue aperas artikoloj traktantaj socialismon, pacismon kaj tutmondismon.

En Hamburgo(1963)kie la 36-an kongreson preparis ĉefe gek-doj Theobald, la nombro de kongresanoj ne estis impona, eble pro la frua dato en julio, kiu al multaj ne konvenis. Sed la solenan malfermon partoprenis multaj gastoj ; dankinde subtenis la kongresanojn ĉi-okaze multaj "neŭtralaj" esperantistoj. Rimarkinde, la elcento da junuloj en tiu ĉi kongreso estis alta, kaj tiu junularo organizis propran "forumon", kie ili antaŭ la kongresanaro sur podio traktis funde la problemon kiel oni povus krei favoran spiritostaton por nia lingvo ĉe la tutmonda junularo. En la gvidrezolucio la Kongreso interalie "rekomendas por atingi pli bonajn rezultojn, igi ankoraŭ pli intimaj la kontaktojn inter SAT kaj la diversaj LEA-oj pere de LEA-komitato". En la novembra n-ro de "Sennaciulo" (1963) K-do Bartelmes komentas tiun rekomendon jene : "La varb-aparato ekzistas ; ĉiu LEA-o zorgis pri eblecoj por funkciado de tiu aparato sur sia teritorio. Temas nun vivigi la grupojn kaj klubojn, aligante novajn membrojn, malŝarĝante tiujn k-dojn, kiuj jam de jardekoj sindonas en la agado por nia afero, de sia peza ŝarĝo, lasante la respondecon al pli junaj homoj. Antaŭ ol pensi pri pligrandigo de la rondo de LEA-oj, necesas firmligi, solidigi la jam funkciantajn asociojn kaj provizi la branĉojn per novaj folioj."

Kiel montris la sekvo, tiuj esperoj nur en tre malgranda grado plenumiĝis. La alfluo de nova sango en la vejnojn de la organismo restis tute nesufiĉa, tiel ĉe SAT mem, kiel ĉe la LEA-oj.

## Ni kongresas en 1964 apud la Mediteraneo.

Tiun 37-an Kongreson de la Asocio en Narbono, suda Francio, antaŭiris voko de la Plenumkomitato en la februara n-ro de "Sennaciulo", atentigante pri la malsufiĉo de enspezoj por ekvilibrigi la buĝeton de la Asocio. Sekve de tiu voko multaj sindonemuloj transsendis helpmonon al la SAT-centro. Pri ĝi en la kongresa gvidrezolucio ni legas, ke la Kongreso "dankas aparte tiujn gekamaradojn, kiuj sekve de la alvokoj en "Sennaciulo" pri la financa situacio kontribuis per ofte tre konsiderindaj sumoj".

Malgraŭ teknikaj mankoj (malbona akustiko en la Laborpalaco, malmoderna kino-instalaĵo en la Junuldomo), la Kongreso faris sub ardega suno pozitivan laboron. Pluraj prelegoj de la Laborista Universitato trovis grandan intereson, kaj la "Forumo" (demandoj kaj respondoj pri proponataj temoj) fariĝas jam vivanta ero de la SAT-kongresoj.

En Narbono la demandoj koncernis la sindikatan movadon en la diversaj reprezentataj landoj, kaj la kontraŭfrankan opozicion en Hispanio. Konkludis unu kongresprezidanto (K-do Levreaud), dankante al O.K.K., kiu ne havis ĉiam facilan laboron, konsistanta fakte el tre malmultaj personoj : "Ne estis malfaciloj rilate loĝejojn kaj ceterajn aferojn. La tendumantoj estis kontentaj... Ni koliziis ne nur kun apartaj malfacilaĵoj, sed kun tiu, kiu apartenas al nia civilizo, - la epoko de la bruo ... Ĝi estas la bildo de nia jarcenta civilizo. Tiu Laborpalaco estas ujo, en kiu devas aŭdigi sin homoj ; ĝi celas plenan efikon, sed tute ne atentas pri la reala rezultato. Same... en la Junuldomo ni aŭdis de la strato bruojn de motorcikloj, kiujn manipulis junuloj, al kiuj nia

civilizo faris malbonan servon..." Tamen malstreĉe okazis ideala banado apud du strandoj.

## Anstataŭ luanto ni fariĝas posedanto de la SAT-oficejo.

Malgraŭ nominala plialtigo de la kotizoj por la jaro 1965 ne sufiĉas tiu ĉi enspezofonto, nek la librovendo, por pagi tre altan sumon subite postulatan de la ĝisnuna posedanto de la ejo, kiun li luigas al ni en Parizo, avenuo Gambetta. Ĉar tiu posedanto decidis vendi ĝin, kaj - kompreneble - li unue faras la oferton al sia luanto, t.e. SAT. La Plenum-Komitato sekve vokis alarme en la januara numero de "Sennaciulo", petante ĉu donacojn, ĉu pruntojn. Ĉar ŝanĝi la lokon tute ne ŝajnis oportune al la estraro. Ĝojiga estis la rapida kontribuo de ĉiuj SAT-aktivuloj al la monkolekto. En la Jara Raporto al la Kongreso de Karlsruhe (la 38-a SAT-kongreso) la P.K. konstatas : "Dum la daŭro de kelkaj semajnoj ni trovis, per nuraj mondonacoj, la necesan kapitalon kaj evitis tiel akcepti ŝuldiĝon pli-malpli longdaŭran, eĉ sen interezo, kiu peze ŝarĝus sur la asociaj financoj por multaj jaroj. La rezultato de l'kampanjo estis eĉ tia, ke ni povas antaŭvidi resanigon de la asociaj financoj..."

En la SAT-oficejo deĵoris ekde 1968 por la daŭro de pluraj jaroj (ĝis 1972) K-do Roger Michaud, sen postuli ajnan monkompenson. Sekvis kiel salajrata oficisto K-do Barkoviĉ en februaro 1972, kiu ankoraŭ hodiaŭ tenas la oficon de administranto.

La oficejo konsistas nun el du koheraj ĉambroj, sen interliga pordo. En la nova ĉambro troviĝas la telefono. La tri oficuloj laboras ne disigitaj de vando.

## Novaj etapoj : la kongresoj de 1965 k 1966.

En Karlsruhe (Germanio) la kongresa organizado estis senriproĉa, malgraŭ la intertempa morto de l' ĉefa invitinto, K-do August Weiler. Pli ol 500 personoj ĉeestis la Malferman solenon, kaj ni aparte mencias la sukceson de l'Infankongreseto kun 40 geknaboj, inter ili du grupoj el Jugoslavio. Ĉeestis entute 447 gekamaradoj en tiu aŭgusta semajno 1965.

Por uzado en internaciaj manifestacioj la LEA-Komitato eldonis prospekton en ok lingvoj sub titolo "Esperanto - Unu Mondo - Unu Lingvo".

Ĉu eblos pliampleksigi "Sennaciulo"n ? demandas la P.K. en artikoleto aperinta en la januara n-ro de 1966. Efektive la membraro reagas favore al tiu ideo, kaj unua listo por tiu nova rubriko, kiu sumiĝas je ronde 40 dolaroj, aperas en la marta n-ro de tiu jaro. La unua dekdu-paĝa "Sennaciulo" (anstataŭ la ordinara 8-paĝa) eldoniĝas por junio 1966. Estas nova ekiro survoje al pli da efikeco !

Kaj tiam okazas en la lasta julia semajno 1966 "la mirinda Kongreso de Svanviko" (Swanwick, Derbiŝiro, Anglio). Ĝi estis la miraklo de unu granda familia rondo en plena harmonio (310 partoprenantoj el 12 landoj). Meze en la kamparo troviĝis tiu unika kongresejo, kie ni aktivis dum tuta semajno, manĝis, dormis kaj kunsidis por SAT-laboro. La partoprenintoj konservas plej belajn memorojn pri tiuj kongresaj tagoj. Propagando eksteren okazas unu fojon en tiu ĉi semajno, dum vizito al Nottingham, la granda industria centro, kie la urbestro akceptis kaj regalis la kongresanojn en la Konsilantara Domo.

En unu kunsido de la LEA-Komitato dum tiu kongreso la delegitoj akceptas la ideon de SAT-Amikaro interŝanĝi delegitojn okaze de LEA-kongresoj. La skeptik-

uloj ĉi-foje malpravis : en la sekvontaj jaroj efektiviĝos reciprokaj invitoj kaj vizitoj al la ĉiujaraj kongresoj de la LEA-oj. Cetere SAT-Amikaro financas regule minimume unu lernant(in)on, kiu distingiĝis en kurso, por partopreno en SAT-kongreso, kie ajn ĝi okazas. La elekto okazas per lotumado.

Postkongreso de la Junularo en tiu somero ankoraŭ bone sukcesas, en farmbieno meze en la montoj de la Peak-regiono. En la sekvantaj jaroj bedaŭrinde tiuj junularaj renkontiĝoj ne plu brilas pro sufiĉa partopreno.

## Iom pli ol 400 kongresanoj en Malmö (Svedio) en la somero 1967.

Malgraŭ la norda situo de la kongres-urbo la kongresanoj spertis varmegajn tagojn ; sole malvarmega estis la akvo de la maro orientborde, kontraste al la akva temperaturo apud Malmö. Tiu tuttaga ekskurso tra Skanio estis iom tro longdaŭra kaj laciga, kaj necesis atentigi la sekvontajn Organizajn Komitatojn, por ke ili ne imitu tiun ekzemplon. La intenco ja estis bona kaj la vizito al la universitata urbo Lund aparte instrua. Notinde ke partoprenis 34 infanoj el Britio sub gvido de la sperta kamarado N. Williams ; tiuj infanoj prezentis programon en la adiaŭa vespero. Imitinda ekzemplo bedaŭrinde malofte sekvata !

La Kongreso en la Gvidrezolucio esprimas sian bedaŭron, ke "malgraŭ la ĉiutagaj instruoj de la politika kaj socia vivo en nia mondo, nia lingvo kaj niaj ideoj tiel malfacile konkeras terenon". Kaj sekvas jena konstato : "Kulpas pri tio ne nur oponado pli-malpli neta de la registaraj aŭtoritatoj, sed ankaŭ la indiferento kaj apatio de la ĝenerala publiko, eĉ de ĝia avangarda parto."

Ja en ĉiu el la venontaj SAT-kongresoj oni povus ripeti tiun saman kanzonon !

En "Sennaciulo" daŭre esprimiĝas libere plej diversaj opinioj.

Se ni trafoliumas la kolektojn de ĉiu jaro de nia periodaĵo monata, ni trovas ĉiam respektata la regulon pri libera pens-esprimo ; ofte ies artikoloj, ekzemple tiuj de K-do Skeldido, elvokas debatojn, en kiuj kompariĝas diversaj tezoj kaj opinioj. La mez-orienta konflikto vokas mult ajn komentojn kaj la ĉiunumera rubriko "Ĉies Opinioj" montras pli kaj pli grandan amplekson.

Evento de la jaro 1968 estas la envojigo de l' eldono de "Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto" trezoro por ĉiu vera esperantisto. En la aprila numero de "Sennaciulo" SAT vokas al antaŭmendoj je favorprezo de 19 dolaroj usonaj. Du mil aĉet-promesoj estas postulataj ; se la rezultato montriĝas pozitiva, la eldono estas certigita. Ĉu ni estis tro optimistaj ? Ne ! En la venontaj semajnoj kaj monatoj alfluas ĉe SAT-ejo la pag-promesoj. Interludo trisemajna : ĝenerala striko precipe de la publikaj servoj, kiu izolis la SAT-centron de la cetera mondo, de la anaro.

Nu, jam en la novembra numero ni komunikas, ke la presisto ne nur tenas la manuskripton, sed eĉ komencis la kompostadon, ĉar "dank'al sindonemo de preskaŭ 2000 esperantistoj, kiuj promesis pag anticipe, ni povis entrepreni la eldonon de tiu ĉi proks. 1600-paĝa volumo". Efektive, dank'al bona kundensigo de la terminoj sur la unuopaj paĝoj la volumo ampleksos nur 1300 paĝojn plus 37 paĝoj de antaŭparoloj kaj klarigaj signoj.

La 41-a kongreso de la Asocio, en Utreĥto, Nederlando, 1968, pasis en la kutima familieca etoso ; en la Gvidrezolucio speguliĝas la evento de majo, kiuj speciale skuis Francion, per jena

alineo : "(la kongreso) sekvas kun granda simpatio la aspiron de la progresemaj studentoj, en monda skalo, al liberiĝo el malnoviĝantaj metodoj kaj pensmanieroj inkluzive de la naciistaj emblemoj kaj bariloj." Partoprenis 347 kamaradoj el 18 landoj en tiu ĉi kongreso.

## Ponto inter Okcidento kaj Oriento.

Ĉu vere estis la ekstercentra situo de la kongresurbo Novi Sad, kiu kaŭzis, ke nur 250 gekamaradoj el 15 landoj ĉeestis la 42-an SAT-kongreson (1969) en tiu loko de Jugoslavio, kiu posedas tre aktivan Esperanto-societon ? Tamen prave en "Sennaciulo" la Komitato substrekis la gravan interligan rolon, kiun signifas kongreso en Jugoslavio, - ponto inter Okcidento kaj Oriento. La Kongreso cetere en sia gvidrezolucio esprimas tiun bedaŭron, ke ankoraŭ ne povis evolui tiel solide, kiel esperis la tutmonda SAT-anaro, la rilatoj inter Okcidento kaj Oriento en tiu ĉi aparte instiga okazo.

En la monatoj, kiuj sekvas tiun kongreson, "Sennaciulo" donas ĉiunumere informojn pri la stato de presigo de la "Plena Ilustrita Vortaro" streĉe atendata de la esperantista popolo. Frontpaĝe en la marta n-ro (1970) de la gazeto fine estas represita unu paĝo specimena el P.I.V. Kaj la Plenumkomitato promesas, ke "la longa atendo estos rekompencata per akiro de unika... normverko de nia Lingvo en ĝia aktuala evolua stadio."

Nu, en julio 1970 P.I.V. aperis, presita en Britio. Kaj K-do Waringhien, la ĉefa aŭtoro, povis svingi la volumegon montre al la publiko okaze de sia kongresa prelego pri P.I.V., rezultato de jardekoj da laboro.

En Aŭgsburgo ja okazis en 1970 la 43-a Kongreso, kiu laŭ aspekto kaj enhavo ja ne tiom multe spegulis

la SAT-idealon kiel ĝiaj antaŭuloj, sed kiu laŭ la poresperanta propaganda flanko estis efikplena. Ekzemple Willy Brandt, tiama federacia kanceliero, adresis telegramon kun bondeziroj al la partoprenantoj. Kaj pluraj altrangaj aŭtoritatuloj el Lando Bavario kaj Urbo Aŭgsburgo ĉeestis la Malferman Solenon (360 ĉeestantoj el 21 landoj).

La Kongreso en sia rezolucio unuafoje reliefigas la nesufiĉecon de nia ĝisnuna agmaniero : "...la nuntempa sociordo malhelpas la klerigajn asociojn kiel estas la nia kaj devigas nin lukti por nia propra vidpunkto, laŭ aliaj manieroj ol la ĝisnunaj, kaj estas firme konvinkita, ke la pliviglígon de SAT ne nur ebligas kontaktoj kun aliaj esperantaj organizoj, sed ankaŭ kaj ĉefe la interrilatoj kun neesperantistaj organizoj pli-malpli konformaj al niaj idealoj."

## Fakoj kaj frakcioj en SAT.

Laŭ iniciato de la tiamaj zorgantoj de "La Juna Penso" okazis dum la Aŭgsburga kongreso (julio 1970) komuna frakci-kunveno, kiun partoprenis reprezentantoj de kvar frakcioj. Tiuj kamaradoj ne havis unuecan vidpunkton pri la oportuno utiligi la paĝojn de "La Juna Penso" anstataŭ aperigi propran frakcian bultenon. La sugesto de LJP-redakcio do estis prokrastita por traktado en la sekvanta, la "Jubilea" Kongreso de SAT ("jubilea" pro la kvindekjara ekzisto de SAT en 1971).

Tiu 44a Kongreso okazas en Parizo kaj Orsay de 31. julio ĝis 6. aŭgusto 1971. Nur la malferma soleno estas aranĝita en Parizo, en la fama Sorbono, respektinda kultura centro de la

francaj universitatuloj. La ceteraj kongres-aranĝoj, la kunsidoj, ktp, disvolviĝas en la Scienca Fakultato de Universitato en Orsay (apud Parizo). Tie, en kunveno de "La Juna Penso" post longaj debatoj akceptiĝis decido pri eldono de Komuna Frakci-bulteno ligita kun "LJP". Tamen ne ĉiuj frakci-sekretarioj donis sian konsenton al tiu solvo. La praktiko poste montris, ke LJP-redaktoroj en la sekvo volonte aperigis la paĝojn, por kiuj kontribuojn liveris la unuopaj Frakcioj. Liberecana kaj sennaciista restis flanke, daŭrigante aperigi proprajn bultenojn. La liberpensula frakcio tute ne plu montris vivkapablon ; sed tiun mankon kompensis relative granda nombro da artikoloj en "Sennaciulo", kiuj traktis liberpensajn temojn.

Pri tiu pariza kongreso mem Plenumkomitato kaj redakcio ricevis diversajn kritikojn, ĉu pri iu flanko de la organizado, ĉu pri la enhavo de la debatoj. L.R. ekzemple konstatas (en "S-ulo" de okt.71), ke "debatoj dum tiu ĉi kongreso evidente montris, ke pli kaj pli larĝiĝas la fosaĵo apartiganta junularon kaj plenkreskularon. La afero jam transiris la staton de simpla miskompreno aŭ de generacikonflikto kaj fariĝas minaca danĝero por nia movado..."

Feliĉe la venontaj kongresoj, precipe tiu de Kuopio, Finlando (1972) malkonfirmis tiun prognozon, kaj aparte K-do Pekka Virtanen, ĉefa organizanto de tiu norda kongreso, sciis arigi ĉirkaŭ si kolektivon da gejunuloj entuziasmaj kaj kunlaboremaj (ankaŭ sur la scenejo !). Neforgesebla restas tiu artoplena prezentado de la ribeliga teatraĵo "Viro kiu ŝanĝiĝis en hundon".

## Diskutoj pri sennaciismo...

Ne nur en tiu tempo, sed ankoraŭ hodiaŭ multaj anoj de SAT ne kapablas diferencigi inter sennacieca kaj sennaciismo. Post la morto de Tuseno (K-do Burnelle)

kaj la senmoviĝo de K-do Caubel pro mortiga paraliziĝo la Sennaciista Frakcio ne plu montris signojn de aktiveco, - parte pro la fakto ke longa hejmiĝo de membroj en la Asocio kondukis ilin al akcepto de sennaciismo, la doktrino de Lanti, sen aparta varbado de la Frakcio. Efektive en multaj artikoloj en la SAT-organo speguliĝas sennaciistaj pensoj, kaj pritrakto de temoj laŭ sennaciista vidmaniero estas ofta. Neniam tamen la sennaciistoj en SAT intencis uzurpi la superregadon, polemikante kontraŭ alitendencanoj. Ili respektas la statuton, kiu klare difinas la kunekzistadon de ĉiuj laborist-tendencaj grupiĝoj (partianoj, sindikatanoj, kooperativanoj, abundanoj, kaj aliaj) en la sino de la Asocio. Jen ekzemple en n-ro aŭgust-septembra de la jaro 1972 "Joĉjo Ruĝulo" (tiam arda junulo ; kio do fariĝis el li ?) ribelas kontraŭ hegemonia rolo (laŭ li) de la sennaciistoj : "... Lanti asertis, ke la aspiro al nacia sendependeco estas vana kaj absolute malutila al la laborista movado. Lanti ja ne kredis, ke iu popolo povas ekspluati alian popolon ; mi do komprenas, se ankaŭ la aliaj sennaciistoj ne kredas tion. Sed estas danĝere, se la tuta SAT komencas pensi sammaniere..."

## Etendiĝu, SAT-flago, trans la oceanojn!

Jes, por la unua fojo en sia historio SAT kongresas en 1973 ekster Eŭropo, dank'al la vivanteco kaj fortikeco de la SAT-rondo en Toronto, Kanadio. Tiu moderna multnacia urbego prezentas al la partoprenantoj ne nur la eblecon laborkunsidi en universitata salonego, sed ankaŭ konatiĝi kun la lando kaj ĝia multkolora loĝantaro. La kongresanoj restis tri semajnojn en la kongreslando (pro la ir- kaj reven-tempo de la luita

aviadilo) ; tio ebligis al la kamaradoj viziti ne nur la imponajn Niagara-kaskadegojn, sed ankaŭ ekskursi plurajn tagojn ĉu al Montreal, ĉu al Kingston, kaj lastan semajnon restadi - kun ĉiutaga ekskursa programo - en Toronto kiel elirpunkto. Ankaŭ la kulturarta programo en Toronto estas altnivela.

En la decembra n-ro de "S-ulo" 1972 la Plenumkomitato devas adiaŭi de K-do Cor van Essen, nederlanda SAT-peranto, kiu dum kvaron-jarcento faris gravegan administran laboron, krom zorgado pri la ekspedado de "Sennaciulo" el Roterdamo. K-do van Essen ne havas bonan sanstaton kaj retiriĝas kun la edzino al la kamparo. Pri la ekspedo de tiam zorgas respondece K-do Wim Quispel. La perant-postenon transprenos K-dino J.G. van Hulst-Maasdam.

## Teorio kaj praktiko.

Ekde la decembra n-ro 1972 ni trovas tre ofte ĉefartikolojn el la plumo de K-do Petro Levi en "S-ulo". Post rezigno de K-do Bannier je rolo de prezidanto de la Plenum-Komitato K-do P. Levi estis elektita de siaj kolegoj kiel prezidanto de SAT. K-do Levi tiuokaze mem substrekis, ke kun tiu rolo de prezidanto estas ligita neniu privilegio, escepte okaze de voĉegaleco ĉe voĉdono ; tiam la voĉo de la prezidanto donas la decidon pri akcepto aŭ malakcepto de propono. (En kazo se la P.K. konsistas el 6 aŭ 8 membroj, ne, se ĝin konsistigas 7 anoj). La prezidanteco antaŭ ĉio estas leĝe postulata. Praktike, ĉe niaj kongresoj de tiam K-do Levi, regule partoprenante, faris la Malferman paroladon.

En la februara n-ro de "Sennaciulo" 1973 la Plenum-Komitato komunikas pri eldonplano "Lanti-verkaro" : tiu verkaro kompleta kaj originala aperu en 4 volumoj ĉ. 200-paĝaj. Ĝi estu fonto por esperantologoj kaj

ankaŭ por propagandistoj. Aperis efektive, nur en la jaro 1976, la unua volumo "Vivo de Lanti" kun suplemento aŭtobiografia "Fredo", verkita de K-do Borsboom. La disvendo ne konformis al niaj esperoj, malgraŭ la bonstila kaj vigla prezento de la temo. En aprilo 1979 aperis la 2-a volumo : "Vortoj de kamarado E.Lanti", en ofseta preso senŝanĝa, sen kompletigo al la unua eldono de 1931. Ni ŝuldas la eldonon al K-do Baudé. (Vidu sube).

## La SAT-Jarlibroj.

La raporto de la Plenum-Komitato al la kongreso de 1973 mencias la pozitivan plibonigon de nia Jarlibro per aperigo de laŭnoma adreslisto, kio permesas trovi serĉatan membron senpene. Sed flanke de tiu perfektigo restas la daŭra problemo de la aktualeco. Kiam la jarlibro aperas, multaj adresoj ŝanĝiĝis aŭ iuj nomoj senvalidiĝis pro eksiĝo, morto ktp. La dujareco de publikigo de la Jarlibro ne favoras aktualan adresaron, sed la modesta kotizo al la Asocio, kiu inkluzivas liveron de la jarlibro, ne ebligas eldonon ĉiujaran.

## La broŝurservo de SAT.

K-do Chr. Baudé (pseŭdonomo Kribo) jam de multaj jaroj sub la ŝildo de La Juna Penso publikigas ĉiujare plurajn broŝurojn stencilitajn, laste ofsetpresitajn kun politika, filozofia, socikritika enhavo, inter ili ekstraktoj el Lanti-verkoj, biografioj kaj diversaj tradukoj ; kelkaj estas nur 16- aŭ 24-paĝaj ; aliaj atingas ĝis 150, eĉ 200 paĝoj . Ĝia disvastigo okazas per la vojo de abonsistemo (poseria abono), kaj kompreneble ankaŭ per unuopaj mendoj rektaj aŭ de perantoj. Ekde 1977 la Servo staras sub la aŭspicioj de SAT.

## Eksteraj rilatoj, kontaktoj.

En la SAT-kongreso de Toronto parolantoj subtenis kaj emfazis la agadon de la humanista asocio "Amnestio Internacia" ; sekve en la Gvidrezolucio de tiu kongreso troviĝas instigo al la membroj apogi tiun organizon ĉie, kie eblas. Pri ĝia aktiveco aperis pli ampleksa inform-artikolo en "Sennaciulo" de junio 1974. En la sekvo montriĝis plurfoje la oportuno kontakti kun tiu efika organismo, kiu faras tiel multon por malhelpi la krimojn de sangaj registoj en granda nombro da Ŝtatoj.

Bergamo en norda Italio akceptis gastigi la 47-an Kongreson de SAT (en 1974). Neordinara okazo, ke SAT kongresas en regiono, kiu estas sub forta influo de la katolika eklezio ! La kongresanoj ĝuis ne nur la modernan, tre komfortan kongresejon, kiel ankaŭ la ekskursojn en de la naturo abunde favorata regiono, sed ili havis ankaŭ la eblecon krei kontaktojn kun laboristaj organizoj, sindikatoj, partio en lando, kie esperanto estas bone konata, kvankam la esperantistoj apartenas ĉefe al neŭtralaj organizoj. Speguliĝas tiel la debato en la Gvidrezolucio. "(La Kongreso) vokas la socialistojn ĉiulandajn subteni la agadon de la Itala Socialdemokrata Partio, kiu daŭre klopodas akceptigi esperanton en la rilatoj de la Socialista Internacio".

Aliaj kontaktoj kun laboristaj organizoj en diversaj landoj maturiĝas ; ekzemple la invito al nia Gotenburga kongreso (1976) de laboristaj gvidantoj, al kiuj la kongresanoj direktis demandojn.

## "Sennaciulo" 50-jara.

Tiuokaze en la novembra n-ro 1974 la redaktoro skribas interalie : "Hodiaŭ ni ne havas motivon por brue

jubilei (laŭ la origina signifo de tiu vorto). Denove monda ekonomia krizo bremsas rigore nian ekflugon al pli granda efikeco ; la indiferenta sinteno de niaj samtempuloj al niaj problemoj, kies gravecon ili ne scias taksi, malpermesas paŝi laŭcele antaŭen, pligrandigi la anaron kaj sekve ebligi pli dikan ĉiumonatan numeron de "S-ulo" ".

## Pri la kongresoj en Hago (1975) kaj Gotenburgo (1976).

En ambaŭ kongresoj la debatoj spegulas la deziron kaj la tiucelajn klopodojn utiligi esperanton por la klasaj celoj de la laboristaro kaj servi kiel peranto ĉe la interrilatoj de nesamlingvaj asocioj, kies celo estas analoga al tiu de SAT (1-a statutparagrafo).

La kongreso en Hago estis perfekte organizita (ĉefe de Roterdamaj gekamaradoj), kaj ĝia distinga trajto estis, ke oni tre malofte aŭdis nacilingvajn sonojn ; ĝin patronis eks-ministro K-do Drees.

Duan fojon Gotenburganoj organizis SAT-kongreson, post 48-jara interrompo. Tiu kongreso aprobis modifon de la 13-a statutparagrafo pri kondiĉoj kandidati por la Plenum-Komitato ; la paragrafo fariĝas malpli rigora, tamen konservante limigon ; sekvanta referendumo tutmembrara sankciis la novan tekston. "La Juna Penso", post skermado inter la ĝistiama prizorgantaro kaj la anstataŭonta teamo, reakiras kiel subtitolon "organo de la Junulfako de SAT". En la unua postkongresa n-ro de "S-ulo" la novaj respondeculoj pri la Junul-Fako vokas al interesatoj respondi demandaron, kiu ebligos kompili Junularan Adresaron.

## Diktaturo mortis en Hispanio kaj Portugalio.

Ni larĝe komentis la ĝojigajn eventojn en tiuj du iberiaj landoj, kie de nun SAT povas evolui libere kaj kie iom post iom re-aliĝas al nia Asocio la malnovaj batalantoj, kune kun tiuj el la juna generacio.

En la decembra n-ro de "Sennaciulo" la redaktoro vokas al pli da kunlaborado por la gazeto. Li plendas, ke ĉiam la samaj kamaradoj kontribuas, kaj ke el multaj regionoj neniu sendas serkaĵojn. Fakte la situacio pliboniĝis tre baldaŭ, precipe ĉar diversaj gekamaradoj ekpartoprenis en la diskutado pri brulvarmaj temoj de aktualeco, en la rubriko "Ĉies Opinioj", kiu ofte ŝvelis ĝis amplekso de du paĝoj.

La Aŭgsburgaj SAT-anoj, konstatinte, ke SAT-estraro vane serĉas kongresurbon por 1977, decidis inviti la 50-an (jubilean) kongreson de la Asocio al sia urbo, post nur sepjara paŭzo. Kiel la unuan fojon, la organizado okazis perfekte, kun solena malfermo en la Augsburga urbodomo. Unuafoje en la gazeto la juna K-do B. de Wit traktas ekologian temon, kiu pli malfrue fariĝos kongresa studobjekto. En sia gvidrezolucio la Kongreso insistas plian fojon pri neceso batali por "garantii la plenumon de Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj, kaj la decidon de la Helsinki-konferenco".

## Post kongreso en granda urbo ni iras en 1978 kamparen.

En sud-okcidenta Francio situas Lekturo (Lectoure), kie ni kolektiĝas por la somera kongreso de 1978. Elstaras du debato-temoj : ekologio kaj etnismo. El la debato pri ekologiaj problemoj rezultas la starigo de ekologia grupiĝo (eble frakcio, eble fako) en SAT, kies aktiveco interalie konsistu el publikigo de broŝuroj ĉe la SAT-broŝurservo.

Pri la etnismo (regionismo) la diskutado fariĝis sufiĉe akra, kontraŭdira ; la kamaradoj, kiuj aprobas la starpunkton de Lanti en tiu demando, bedaŭris, ke estis invititaj neesperantistaj reprezentantoj de regionisma movado. Tamen en la gvidrezolucio de la kongreso troviĝas la alineo : "La konservado de gentaj lingvo kaj kulturo estas ligita kun la lukto por nova sociordo, sekve unu ero en la strebado ĝenerala de SAT-anoj al justo kaj individua libero."

La subteno materia kaj morala de la socialistaj komunumoj en la regiono, dum kaj post la kongreso, estas rimarkinda fakto.

## Kaj ni restas kampare en la sekvonta jaro...

Ĉar Swanwick (Sŭonik) kun sia Sinjora Domo akceptas nin por la dua fojo, post paŭzo de 13 jaroj, kie ni ĝuas trankvilon kaj amikan kunrestadon, havante la eblecon koncentriĝi sur la aktualaj taskoj. La Organiza Komitato surprizis nin per prezento de opereto de Gilbert kaj Sullivan, kun esperantista ĥoro, kiu tre arte plenumis sian rolon. La idilian Domegon kaj Ĝardenon ni forlasis nur por ekskursoj en la anglan Mezlandon, por instruiĝo kaj amuzo ; tre instrua estis la ĉefa ekskurso al Stoke-on-Trent, lulilo de la frua industrio kaj de la laborista movado.

## En 1980 al Jugoslavio.

En tiu jaro ni por la tria fojo kongresas en Jugoslavio. La SAT-rondo de la apudmara helkolora havenurbo Rijeka akceptis la organizadon de la 53-a Asocia kongreso. Ĝi distingiĝis ne nur per la kutimaj laborkunsidoj, debatoj, proponoj, sed ankaŭ per plaĉaj ekskursoj al tre vizitindaj lo-

koj. Sur la laborterreno estis akceptita Deklaracio pri lingva politiko prezentita de K-do P. Zlatnar kun celo instigi la intereson de sindikataj, kooperativaj kaj internaciaj organismoj pri nia agado de mondlingva raciigo. La propono tekstas : "Ĉiu principe rezignu uzi la propran nacian lingvon en rilatoj kun aliaj popoloj, kaj Internacia Lingvo Esperanto, samgrade fremda kaj samgrade propra al ĉiu, fariĝu dua lingvo por ĉiu kiel komuna lingvo por internacia uzo kaj esprimo de aparteno al la pli larĝa homa komuneco."

## La Bazela Kongreso en jubilea jaro de SAT.

En Bazelo, simbola urbo en lando de demokratio kaj lingva kaj spirita toleremo, kie tri landlimoj kunfluas, la SAT-anoj solenis la sesdek-jarecon de la ekzisto de nia Asocio. Kvankam, kiel ĉiujare, superis nombre la gekamaradoj el Francio kaj Nederlando en tiu ĉi kongreso, tamen el multaj, eĉ tre foraj regionoj de nia terglobo partoprenis reprezentantoj de nia peresperanta, porsocialisma movado por atesti pri sennacieco kaj universaleco dank'al la komuna lingvo. La LEA-Komitato havis plurajn kunsidojn, en kiuj la delegitoj decidis "evoluigi konkretajn formojn de reciproka komunikado kaj informado kaj ankaŭ organizi kontaktojn kun laboristoj en aŭ ekster la kadro de l' entreprenoj kaj de la SAT-kongresoj."

Tiel finiĝis la dua tridek-jara vivperiodo de SAT.

# La Plenum-Komitatoj de S.A.T. de 1952-1981.

(Sekvo de la Tabelo en la unua volumo, p.129-130)

1952. K-ino Dazun, K-doj Bannier, Bartelmes, Cuisinier, Glodo, Piron.

1954. K-ino Dazun, K-doj Bannier, Bartelmes, Hardy, Piron, Lévy.

1957. K-ino Dazun, K-doj Bannier, Bartelmes, Hardy, Lévy, Piron.

1960. K-doj Bannier, Bartelmes, Chevrolat, Hardy, Lévy, Piron.

1963. K-doj Bannier, Bartelmes, Chevrolat, Hardy, Lévy, Piron.

1966. K-doj Bannier, Bartelmes, Chevrolat, Lebec, Lévy, Piron.

1969. K-doj Bartelmes, Chevrolat, Lebec, Lévy, Michaud, Piron.

1972. K-ino Ternant, K-doj Bartelmes, Chevrolat, Dreschmann, Lebec, Lévy.

1975. K-ino Ternant, K-doj Bannier, Bartelmes, Chevrolat, Dreschmann, Lebec, Lévy.

1978. K-ino Ternant, K-doj Bannier, Barkoviĉ *, Bartelmes, Chevrolat, Lebec, Lévy, Selle.

1981. K-inoj Chardon, Ternant, K-doj Bannier, Barkoviĉ, Bartelmes, Cavalier, Chevrolat, Soares.

---

* K-do Barkoviĉ laboras kiel dungito por administracio seninterrompe depost februaro 1971 ĉe la SAT-oficejo en Parizo.